GISTO, SEP.2008
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
Redaktas: ottovaske@ibest.com.br
Donaca, ĝi celas monate kunigi gesamideanojn.
Je ĉiu forresto:R$ 01,00 da solidareca ŝuldo al la kaso!

0909090909090909090909090909090909090909090909090909090909090909090909090909

IDEO / SUGESTO

Domaĝe mi vekiĝis iom malfrue, por kapti avantaĝojn niafavorajn, de politikistoj, antaŭ la 05/10/08. Certe ankaŭ en POA vin ĝenas falsaj ridetoj de balotĉasistoj, de konataj kaj nekonataj uloj. Kion vi respondas? Eble nenion sed, bv pripensi, kiom da homoj elspezas monon por asekuri al si plian voĉdonon. Materiala donaco estas kontraŭleĝa. Ni lerte diru: mi garantias al vi mian voĉdonon kontraŭ eta donaco. Aranĝu kunsidon de viaj gefamilianoj kie mi rajtos montri kiom bela, mirinda kaj utila ktp.estas la lingvo transnacia Esperanto. Mankas pokaj tagoj sed, ĉe la fino ili freneze atakas ĉie kaj ĉiun ajn por eĉ surgenue almozpeti nian subtenon. Se alia "fajrero", pli efika trafos vin, ne hezitu inteligente apliki ĝin! – Nura perdo kiu povas okazi? Ke li/ŝi diros NE!

IDEO-II

Ĉi-ero, pli facile realigebla, se aprobite, postulos iom da investo. Jen ĝi: ĉe liveranto mendi amason da etaj porcioj da sukero, salo aŭ likva dolĉigaĵo, kiel tiuj disponigataj en restoracioj/memservoj, kiuj kutimas liveratas en malgrandaj papersaketoj. Pensas mi, ke ilia kosto estas ĉipa. Ni, varbemaj gesamideanoj, zorgus ke sur la saketoj legeblas (ekz.) **Esperanto língua 100% regular (**adreso**)** plus kelkaj E-vortoj. Mastroj de manĝejoj ŝatas tiun sistemon por eviti ke klientoj ne fuŝe trouzu tiajn spicaĵojn. – Dum milito ĉio validas. Kion vi opinias?

NEPARADEMA TURISTO

Ne atendite alvenis eta letero far nia diligenta Arno el Arrojo do Mejo, kies unu ero diris: mi trovis flugon al Brazilja, per Learjet-avio, mi ne volas paradi per mia feliĉo...panjo ĉiam instruis: "Memlaŭdo stinkas" iel simila al kion diradis miaj gepatroj: "Melki laŭdojn fetoras". El tio rezultas ke mia persona karaktero forte kunpuŝiĝas kun la ĉitiea kutima maniero fiere mencii sin mem unualoke, kiam homo senskrupule kaj laŭte citas, ekz.: "tie laboris unue (alveninta) **MI**, tiualia plus kelkaj aliaj amikoj..." Homoj kutimiĝintaj al tia maniero fiere paradi kiel pli valoraj ol la ceteraj en la momento menciitaj, eble estas nenio riproĉinda sed por modestaj, bonedukitaj personoj, kiel azianoj kaj nordeŭropanoj tia sinteno forte elstaras negative. – Laŭ mi, tia sinteno montras la kaŝitan fiintencon kontraŭ proksimuloj el kiu rezultas la aĉaj enbreĉiĝoj en vicojn starantaj homoj antaŭ giĉeto de poŝtoficejo aŭ por akiri busbileton, ekz kaj kaŭzas malpacon.

KONDOMOJ

Du semajnojn antaŭe la Preso raportis ke oni disponigas, kondomojn al gelernantoj. Samtempe raporto informis ke 38!...tridek ok procentoj da lernantinoj forlasas sian studon kaŭze de gravediĝo kaj ties konsekvencoj. Nu ja, ni maturaj homoj bone scias kiom ofte kondomoj ne 100% ŝirmas kontraŭ gravediĝo. Cetere, geamantoj neglektas uzi ĝin, kiam la renkontiĝo ne celas amoradon kaj ambaŭ

ne kunportas preventilon sed favoraj cirkonstancoj, ruze aranĝitaj, prezentiĝas. Tiurilate nepre okazas tio, pri kio nia karmemora kaj elstara poeto Leopold Knöd kunmetis bonhumuran rimaron:

SIMILAĴOJ

Kvankam ofte ŝajnas,
La aferoj senrilataj
Ili similecon gajnas
Se pli funde rigardataj.
Jen la sama origino
De la trobakita pasto:
Ĉe elpreno – troprokrasto.

APELACIO

Karaj gelegantoj, mi iam rakontis pri honto suferita dum mi estis bubo kaj knabaĉo kaj petis ke ĉiu rakontu iom pri sia pasinteco. Nun mi denove provas eltiri el viaj travivaĵoj rakontindajn eventojn. Ne kredeblas ke vi havas nenion rakonteblan al niaj VK-rondanoj aŭ, ĉu vi ĉiuj faris tiajn gravajn friponaĵojn ke vi preferas ne elmeti vian personecon eĉ ne inter ni (kaj la cetera verda mondo)? Ne risku nur silente legi miajn diktarocenajn (laŭ Solon) monologojn. Tia sinteno konfirmos ke vi ne kuraĝas rakonti erojn de via vivo kaj igas la kunulojn suspekti pri via fidinda amikeco...hi...hi! Certe vi ne pretendas kredigi nin ke vi ne plu scias resume surpaperigi eĉ malgrandan, ĝojigan tekston, dum la monato ie legitan kaj inda je plezurigo de ni ĉiuj. - Mia "memkontrolilo" avertas min ke, manke de reagoj viaj, mia repertuaro tedas vin. En la aviado la ĉefejo kutimis instaligi, ene de la motoro, etan aparaton kiu denoncis kiam la flugistoj troe aldonis brulŝtofon (benzinon), por rapidigi la flugon kaj atingi difinitan tranoktejon sufiĉe frue. Vi, inteligentaj legantoj, divenas la veran motivon kio altiris junajn pilotojn: inoj, sciaj pri la alveno de difinitaj flugistoj, ofte preparis "varman" datrevenon por la vespero.

SENTENCOJ – Thorsen, el INOE-revuo.

La subĉiela nudismo/Limigu sin al tropikoj – Ĉi nobla ekspresionismo/Super kaj sub umbilikoj – En malpli favora klimato/Ne multe favoras al gvato.

Ne ekzistas kostumoj decaj,
Nur homoj tiaj kaj alispecaj.
Inter la stato vestita kaj nuda/
Eblas kompromisi: Kovri la korpon per farbo tatua/ kaj poste per kisoj striptizi.
Vualo vizaĝa estas obskuro/
Simila al la berlina muro.
Neniu kisas lipojn/nur ĉar ĉi tiuj nudas/Portante vest-ekipojn/Ĉu ajnaj tial prudas?
Butika ekspono de karno/Neniel alvokas indignon./Do kial nudula ĉarmo/"Morale"vekas malignon?
Admiri nudecon libide/Ne eblas nur pretervide.
Iom post iom la ban-bikinoj/Tiom mikroskopas/Ke G-strioj de nenudistaj modulinoj/Forestas por kiuj miopas.
Absurda repliko/Al naturisma amiko:
"Por ĉi-vespere festi/Mi tute nenion havas por vesti".
Almenaŭ du agoj kondiĉas/foreston de kostumo:Unu dum ni naskiĝas/Alia dum la seksumo.
Laŭ kaj la Biblio kaj PIVO/La lumbo kaŝas paradoksojn./En lumbo la forto, plezuro de l'vivo,/sed nepras unue karesi la koksojn.
Jes, mi verkas, verkadas pene/Kaj tamen lamas la vendo./Ĉu eble ĝi kreskus, se mi senĝene/Ilustrus per gapa pudendo?

MSĜ -- .- .-. ...- ? /// --.- ... .-..?

INFANOJ, de Leopold Knöd

Bubo el unua grado
La instruistinon tedas
Per konstanta galantado.
Ŝi sin liberigi kredas
Kiam li ŝin reinvitas.
"Ba, infanojn mi ne ŝatas"
"Stulto! Tiujn ni evitas"